


LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

LA AKRIDOJ ALVENAS. (DAŬRIGO).



La monatoj septembro kaj oktobro jam pasis; ili estis tre varmaj, sed ne varmegaj. La aŭtuno alvenis kaj kunportis *siajn* donacojn. Ĉie oni povas rikolti la fruktojn: ne nur bananojn (tiujn fruktojn oni kulturas dum la tuta jaro), sed multaj aliaj fruktoj nun estas maturaj, ekzemple la vinbero, la figo, la daktilo, la pomo, la piro, la melono, la papajo (papaia) aŭ arbamelono, la melonpiro, la kaktafigo, la marakujo (maracuja) por konfitaĵo, la mango

(manga), la anono (anona), k.t.p.

Multaj arboj kaj arbetoj ŝanĝis *siajn* kolorojn: la vitoj nun estas ruĝaj, la folioj de aliaj arboj nun estas flavaj aŭ brunaj. Sed ankaŭ restis multaj arboj, kies foliaro ĉiam estas verda.

Estas sabato en novembro. Felipe kuras al *sia* hejmo; li spi-regas.

„Patro”, li krias, „la akridoj alvenas.”

Patro eksaltas. „Kiu diras tion?” li demandas.

„Laŭ la policano nia vilaĝestro ricevis oficialaĵon komunikaĵon”, respondas Felipe.

„Kiam ili estos ĉi tie?” demandas Patro.

„Oni atendas iliN morgaŭ tre frue en la mateno.”
„Diable!” malbenas Patro. „Iru tuj averti SinjoroN Delmonto kaj la aliajN najbarojN.”

Felipo forkuras kaj Patro avertas LuizaN; post tio li iras kolekti grandaN amason da branĉoj, ligno kaj aliaj brulaĵoj.

Intertempe Luiza kolektas ĉiujN sitelejojn, kaldronojN, patojN, kaserolojn, fajrostangojn kaj fajroprenilojn kaj metas ilin sur la kampo.

Baldaŭ ĉie la homoj preparas siN por la batalo kontraŭ la akridoj.

El letero de juna franca Esperantisto.

Ni pasigis belajn tagojn en la Esperanto-lernejo. Sablé ne estas bela urbo, kaj ĝi ne vivas: la stratoj estas silentaj kaj monotonaj. Sed la Esperanto-atmosfero plenigis nian koron per ĝojo kaj frateco. Ni ekskursis kaj ni baniĝis en moderna banejo. La akvo en ĝi estis ĉiam 24 gradojn varma. La enirprezo estis tre alta: 14 frankojn. Sed oni povis preni familian abonon. Ni do serĉis la banemulojn en nia grupo, kaj ni akiris familian enirkarton. La urbestro ja bonvolis rigardi nin kiel anojn de unu granda familio. Kaj fakte nia familio estis granda, ĉar ni estis dudekope. Ĉar la enirprezo malaltiĝis laŭ la infannombro, ni pagis malmulte. Nia familio ja konsistis el gepatroj kaj dek ok infanoj! Tiel ni povis baniĝi ĉiuposttagmeze!

Kiam ni forlasis la someran lernejon, ni estis tre malgajaj, kiel ĉiam post feliĉaj tagoj. Ni reiris bicikle al Sassenage, do ni vidis multajn regionojn. Sed ni ne restis longe en ĉiu regiono, ĉar ni kredis, ke panjo ordonis nin esti hejme je la unua de la monato. Tial ni restis preskaŭ la tutan tagon sur la biciklo. Ni veturis proksimume cent kvardek kilometrojn en unu tago, kaj la vojo de Sablé al Sassenage estas okcent kilometrojn longa. Ni nur haltis por manĝi kaj dormi. Estis bela vivo! Kiel matenmanĝon ni manĝis densigitan lakton kun pano, kaj poste fruktojn. Sed, ĉar ni forgesis telerojn, kulerojn, ktp., ni mem faris ilin: Ni fosis truon en dika peco da pano. Tio fariĝis telero, en kiun ni verŝis la lakton. Cetere, ni nur en la mateno bezonis teleron, ĉar tagmeze kaj vespere ni manĝis fruktojn. Ni aĉetis tri kilogramojn da tomatoj, samtion da vinberoj kaj du melonojn, kaj tio sufiĉis. Foje ni ne povis trovi panon, do ni ne sciis, kiel trinki la lakton. Sed mi proponis: „Ne grave, ni aĉetu du melonojn. Ni formanĝu la internon, kaj la ŝeloj bone taŭgas kiel teleroj.” Ni faris tion. Ni verŝis la lakton en la melonajn ŝelojn, sed ĉar ni ne havis kulerojn ni forlekis la lakton kiel katoj. Kaj miaj gefratoj ridegis.

Kiam ni alvenis hejmen posttagmeze, ni tre miris! La domo estis fermita! Ni alvenis tro frue. Tio nin ĉagrenis. Ni klopodis malfermi la pordojn, sed ni ne sukcesis. Fine Johano proponis, ke ni klopodu eniri tra la fenestroj. Kun kamarado li prenis ŝtupetaron kaj atingis la fenestroŝirmilojn. Per fera stango li malfermis ilin. Feliĉe la fenestroj mem ne estis fermitaj, kaj ni do povis eniri la domon. La sekvan matenon panjo alvenis kaj trovis nin en la litoj.

Ĉu ni ridu?

Onklino: „Ĉu vi, Vilhelmo, ludas kun malicaj knaboj?”

Vilhelmo: „Jes, onklino!”

Onklino: „Ĉu vere! Kial vi ne ludas kun bonaj kamaradoj?”

Vilhelmo: „Iliaj patrinoj ne permesas tion!”

„Ĉu miaj filetoj bone kondukis dum mia foresto?” demandis patrino al la infan-vartistino.

„Jes, la tutan posttagmezon, ĝis la lasta momento. Tiam Mateo kaj Karlo komencis batali pro tio, kiu el ili kondukis pli bone!”

Por la infanoj.

SIPVETURI (Ludkanto).

3 . 2 1 5 | 6 1 6 5 . | 5 5 4 3 2 . | 5 5 3 2 1 . |
 Sip-ve-tu-ri sur la mar', Kun la a-mi-kar', kun la a-mi-kar'.

3 . 2 1 5 | 6 1 6 5 1 2 | 3 . 1 2 . 7 1 . 00 ||
 Se vi iros ne kun mi, iru el la ŝipo vi!

—La infanoj staru en vico. Unu el illi dancu flanken, tien kaj reen. Dume ĝi turnas la vizaĝon al la vico. Ĉiuj infanoj kantu kaj ĉe „kun la amikar” le dancanto elektu iun el la vico. Ambaŭ dancu nun sammaniere, sed la elektito turnas sian vizaĝon al la unua. Ĉe „iru el la ŝipo vi” la unua reiru en la vicon. Nun la dua dancu sola flanken, tien kaj reen, nun kun la vizaĝo al la vico, kaj tiel plu.

Rogiero.

Kiu volas ion scii?

Nun ni preparolos la aĝojn de la insektoj.

Papilio atingas aĝon de proksimume unu semajno, sed tamen ĝia vivo estas multe pli longa. La unuajn tagojn de sia bela vivo

ĝi pasigas nome kiel raŭpo. Ĝi rampas kaj manĝas foliojn; ĉiam ĝi manĝas nur foliojn. Poste ĝi estiĝas pupo. Ne pupo por ludi, ho ne! Ĉu vi supozas tion ĉi? Ne; tia pupo, kia ankaŭ nomiĝas krizalido. Nun ĝi kuŝas aŭ pendas senmove kaj manĝas nenion. Iom post iom ĝi ŝanĝiĝas en papilion. Je la plej bela tago de sia vivo ĝi rampas el sia kokono kaj flugas, ĝi flugas. Ĝi flugetas de floro al floro kaj suĉas nektaron. Post unu tago ĝi devas morti, kaj tamen ĝia vivo estas multe pli longa. Ĉu vi nun komprenas kial?

Ankaŭ la aliaj insektoj havas metamorfozon. La majskarabo aŭ melolonto, kiu vivas nur dum kelkaj semajnoj, pasigas tri jarojn kiel larvo en la tero.

Kaj la pulo? La pulo povas atingi aĝon de du jaroj kiel plenkreska insekto. Ĝia tuta vivo estas multe pli longa. Kiel larvo ĝi vivas en la plankfendoj kaj manĝas polvon, fakte la mikroskopajn vegetaĵojn aŭ aliajn estaĵojn el la polvo. Poste ankaŭ ĝi fariĝas pupo kaj restas tia kelkfoje dum jaroj. Nur kiam estas tre, tre varme, ĝi travivas sian plej feliĉan momenton: ĝi iĝas pulo. Ĝi saltas, saltas, kaj suĉas homan sangon!

Rogiero.

Ludo (La kavaliro kun la fajfilo).

La ludantoj staras aŭ sidas en rondo. Unu knabon oni forsendas. Kiam li revenas, li devas genui en la mezo, kaj dum komika parolado oni faras lin „kavaliro”. Dume unu el la ludantoj tre singarde fiksas, per ŝnureto, fajfilon sur la jakon aŭ bluzon de la „kavaliro”. Kompreneble ĉi tiu ne sentu tion. Al la nova „kavaliro” oni nun ordonas serĉi la fajfilon. La aliaj ŝajnigas, kvazaŭ ili kaŝus ĝin, kaj kompreneble la „kavaliro” saltas tien, ĉar li kredas, ke ili havas la fajfilon. Sed subite li aŭdas post si fajfadon. (Knabo aŭ knabino faras tion, per la fajfilo sur la kavaliro). Li tuj turnas sin, por kapti la knabon aŭ knabinon post si, sed neniu havas la fajfilon. Tiel oni daŭrigas, ĝis la „kavaliro” eltrovas, ke li mem portas la fajfilon.

Bela sonĝo (verkaĵo de juna franca knabino).

Mi estis en belega lando, eksterordinara, kie ĉiuj homoj parolas la esperantan lingvon. Ili helpis unu la alian, kaj ili amis ĉiujn. En tiu lando neniu parolis pri landlimoj, ĝi ne havis armeon. Ili estis tre feliĉaj.

Juliette Juillard, Pontarlier. (Libervola teksto, farita post 10 lecionoj).



TJO-RUBRIKO.

(Sokr. M. v. d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam, Ned.).

La dua sekretariino de TJO, Mary Kryt el Amsterdam, pro profesia laboro je la fino de januaro forlasis Nederlando por iri al Peruo en Sud-Ameriko.

Mary, ni deziras al vi ĉion bonan. Ĝis revido! Ni ne forgesos vin, vi ne forgesu TJO-n!

Francoj, bonvolu atenti, ke la kotiz- kaj abonprezoj ŝanĝiĝis por via lando! Ĝis posta sciigo, oni pagu la egalvaloron de 5 ŝil.

Germanujo: En Berlino laboras esperantista junulargrupo. Ankoraŭ ĝi estas eta grupo, sed tamen ĝi jam havis grandan sukceson. La Zamenhof-soleno estis vizitata de preskaŭ 600 homoj.

Nederlando: La grupo en Harlema organizis semajnfinojn je 17-18 jan. en la junulargastejo. Ĝin partoprenis 80 anoj, el ĉiuj partoj de Nederlando. En la festvespero ĉeestis pli ol 200 homoj. Dimanĉmatene okazis laborkunsido de la nederl. sekcio. Pri traktata estis i.a. la nova nederlandlingva propagandorgano „De Esperantist”. La diversaj lokaj grupoj forte propagandos ĝin, kaj klopodos varbi per ĝi simpatiantajn T.J.O.-anojn. La landa somerkunveno okazos ĉijare en Groet, apud la Norda Maro, en la plej bela regiono de Nordholando. Kompreneble ankaŭ eksterlandanoj estos bonvenaj. Loka organizanto estos s-ro W. Bant. — Je pentekosto la grupo en Hilversum organizos semajnfinojn. — Oni ankaŭ esploros la eblecon organizi specialan kunvenon por kurs kaj grupgvidantoj. — Montriĝis granda intereso por la internacia junularkunveno en la Bavaraj Alpoj, je 18—24 majo.

Polujo: En la antaŭa numero ni erare notis la adreson de la nova ĉefperanto. Ĝi estas: Benedykt Palczýnski, Sopot, W.S.H.M. Al. Armii Czerw. 101.

La infanintersaĝo.

Denove mi demandas vian atenton por tiu ĉi afero. Kvankam la afero marŝas sufiĉe bone, tamen nur kelkaj grupoj skribis al mi. Ĉefperantoj, ekzameni la eblecojn en via lando! Kiam mi legas la korespondrubrikon en L.J.V., mi vidas multajn adresojn de infangrupoj. Ankaŭ ili povas partopreni en la intersaĝo. Do instigu ilin!

S-ro A. de Nieuwe en Haarlem (Ned.) sciigis ke liaj kursanoj jam korespondas kun du grupoj en Anglujo, nome kun grupo de

s-ro Toms en Dagenham kaj kun grupo de s-ro Teare en Halewood. La lernantoj de ambaŭ sinjoroj jam serioze ŝparas por veni al Nederlando, kaj la knaboj en Haarlem faras la samon por iri al Anglujo: La geknaboj en Groet korespondas kun „La Verda Junularo” en Landeck (Tirol). Tio estas bona ekzerco kaj donas al la korespondantoj multan plezuron.

Mi esperas, ke mi baldaŭ ricevos leterojn de la aliaj grupoj el diversaj landoj. Ni ja formas „unu grandan familion”, do geamikoj montru tion kaj invitu junajn geanojn de via granda Esperanto-familio.

Rompu la murojn inter la popoloj!

Adr. W. Bant, Lernejestro, Groet (NH), Nederlando.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Estas definitive, ke la I.J.K. en 1948 okazos en Ĉeĥoslovakujo, sed oni ankoraŭ hezitas inter Karlovy Vary kaj Doksy. En Karlovy Vary dumsomere estas tre plene, do eble Doksy estus preferinda. Cetere ĝi kuŝas pli proksime al Praha. Oni momente esploras la eblecojn en ambaŭ lokoj. Plej verŝajne la ĉeĥoslovakaj fervojoj donos konsiderindan rabaton. La organizanto estas tre optimisma, kaj faros ĉion, por ke la restadkosto estu kiom eble plej malaltaj.

Do — geamikoj — preparu vin por la vojaĝo al Ĉeĥoslovakujo! Espereble ni en la marta numero povos doni detalojn pri vojaĝeblecoj, tempo, vojaĝ- kaj restadkosto.

SKOLTA RUBRIKO.



Krakovaj skoltaj lernas Esperanton. Trideko da skoltaj de la 1-a Ŝtata Liceo kaj Gimnazio en Krakovo, Polujo, partoprenis en la elementa Cseh-metoda kurso de Esperanto, gvidata de prof. Sygnarski en la tempo de 7. X ĝis 5. XII, 1947. El ĉi tiu nombro 12 (la plej diligentaj) faris skriban kaj buŝan ekzamenojn kun tre bonaj rezultoj kaj je la 22a de dec. 1947 okazis en skoltejo solena disdonado de „Atestoj”, subskribitaj de la kursgvidanto kaj de la lernejestro). La partoprenintoj volas daŭrigi la lernadon de

Esperanto en supera kurso kaj samtempe korespondi kun geskoltoj en la tuta mondo. Skribu do, karaj geskoltoj, kaj indiku vian precizan adreson. Sed skribu legeble! Respondon garantias kaj korespondaĵojn akceptas:

Prof. Mieczyslaw Sygnarski, lektoro de E-to en Jag. Univ., Krakovo, Sloneczna 4 m 23, Polujo.

„DENASKA ESPERANTISTARO“-RUBRIKO.

Tre karaj genevoj kaj gepatroj! — En la komenco de decembro mi devis suferi operacion, kiu, je mia aĝo (86-jara), nuligis mian eblon plue konduki la aferojn de D.E., de kiu mi estis kunfondinto en 1938. — La estraro de T.J.O. tre bonvole tuj pretis entrepreni la aferojn, laŭ aranĝata interkonsento, pri kiu mi antaŭ nelonge informis vin.

Tute malvolonte mi forlasas mian amatan laboron por vi; sed mi preĝas ke vi daŭrigu, ĝis vi ĉiuj iĝos lojalaj Esperantuĵanoj!

Volas manpremi vin (aŭ kisi — laŭ via aĝo!)

Pra-Onklo Roberto (Prezidinto).

NOVAJ ANOJ (kun naskiĝdatoj): George, Karina 11-11-'45, Nachtingalplaco 28, Berlin N 65, Germanujo; Kitonic, Davorka, 12-3-'47, Špišič, Bukovica, Hrvatska, Jugoslavujo; Knecht, Danielle 12-11-'46, 5 rue Export Besançon, Oued-Zem, Maroko; Fingerlos, Johann 3-10-'37, kaj Greti 4-6-'44, Atzgers Dorferstr. 111, Wien XII, Aŭstrio; Bartošik, Karel Tomas 27-6-'42, Hana Rujena 12-3-'47; Mila Zdenka 12-3-'47, Na černem vrchu 31, Praha XVI, Ĉeĥoslovakujo; Prent, Heleno Margareto 1-4-'41, Maretakstr. 9 B, Rotterdam, Nederlando; Rykkvin, Helge 22-8-'45 kaj Joslein 16-3-'43, Holtermannsweg 8, Trondheim, Norvegujo; Mychajliw, Tatjana, 4-11-'40 kaj Myron, 29-8-'45, 13 a Leonrodstr. 2-1, Bayreuth, Bavaria, U.S.Zone, Germanujo; de Visser, Eric H., 8-11-'39, Lyda M., 22-6-'42, kaj Gonda A. P., 9-7-'46, Oude Hovenstr. 6, Dordrecht, Nederlando; Fisher, Marcella Doris, 10-4-'42, Margaret June, 10-6-'44 kaj Conrad, RFD 1, Meadville, Pa., Usono; Feigl, Werner, 7-7-'43, Sonnewalderstr. 59, (2) Finsterwolde NL, Germanujo; Quiles, Araceli 23-7-40, Ricardo 23-12-'41, kaj Armanda 24-2-'47, San Vincente 186, Valencia, Hispanujo; Hansen, Karlo Elud, 20-11-'46, 92 Cannon Street, Neg York 2, U.S.A.; Schmitt, Bernard, 16-4-'41; 40 rue de Mon Désert, Nancy, Francujo; Fondrillon, Marie Blanche, 27-10-'39, 6 rue Claudion, Nancy, Francujo; Krause, Hans Christian 11-11-'41, Oldenburg Allee 18', Charlottenburg 9, Berlin, Germanujo; Blasimme, Paŭlo, 22-9-'46, Piazza Epiro 36, Roma, Italujo; Bahn Günther 3-5-47, Wilhelmstrasse 17, Bernberg (19), Sachen-Ahnhalt, Rusa zono, Germanujo; Walder, Ruth Alice, 6-10-'47, Eigenheim, Romanshorn, Svislando; Liechti, Edith, 30-9-'47, Grünanstr., Rheineck, Svislando; Ĝivoje, Jadranko 14-5-'47, Savska cesta 19-11, Zagreb 1, Jugoslavujo.

Nederlandanoj, ĉu vi jam mendis kvanton de „De Esperantist“? Jam aperis la 2-a No. Varbu per ĝi simpatiantajn TJO-anojn!

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Britujo: Dez. kor. pri Jaz- kaj Sving-muziko 18-j. J. „Kon” Walsh, Esperanto-House, 14 Leopoldstr., Leeds 7, Yorks.

S-ro R. G. Richardson, BM/GRAN, London W.C. I, fraŭlo, dez. kor. kun knaba amiko iuaĝa. Sendu foton.

Deziras korespondi kun alilandaj samaĝuloj: George Clark, 16-jara, 216, Whyterose Terrace, Abehill, Methil, Fife, Skotlando; Maud Laffin, 409 Wellesley Rd, Methil, Fife, Skotlando (13-jara); Sonya Hutchinson, 115, Den Walk, Methil, Fife, Skotlando (13-jara); Margaret Knowles, 176 Taylor Str., Abehill, Methil, Fife (14-j.).

Bulgarujo: S-ro Nikola Ivanov Dimitrov, selo Kaltinec, Gorno orjahovsko, 20-jara studento de ekonomio, deziras korespondi.

Francujo: „Verdstela Grupeto”, knaboj 12-14-jaraj, dez. korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu al instruisto S-ro M. Retot, 18 str. Butte-aux-Cailles, Parizo 13a (Certe respondos).

Mi estas 8-jara denaska esperantisto. Por daŭrigi la propagandon en mia lernejo: Helpu!! Sendu al mi poŝtkartojn kun bildo pri naturaĵo, kuriozaĵo, ktp. el via loĝloko. Skribu mallongan klarigon pri ĝi. Afranku belaspekte. Ne forgesu la vorton Esperanto. Ankaŭ leteroj estos bonvenaj. Mi respondos laŭpete. Dussart, Michel, Mondeville par la Ferté-Alais, Seine & Oise.

André Gente, kursgvidanto, Visan (Vaucluse), dez. gekorespondantojn el ĉiuj landoj por komercantoj kaj progresintoj.

S-ro Louis Duquenne, 190 rue de Douai, Sin-le-Noble (Nord), dez. kor. kun f-inoj 19-25 jaraj el la tuta mondo. Certe respondos.

S-ro G. Tremon, 35 R. Sablière, Paris 14e (24-j.), elektristo, dez. kor. pri ĉiuj temoj kun junaj gekorespondantoj (p.k., p. m., junaĝoj, ktp.).

Hungarujo: Johano Blach, Miskolc, Attila-str. 16, deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo.

Komitato de la junularo de Ferfabriko Diosgyör dez. kor. kun gejunuloj el la tuta mondo. Adr: Szit-Esperanto-Grupo, Diosgyör, Vasgyár, Adrási-str. 13.

Nederlando: (Korekto): Gelernantoj (14-45-jaraj) dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Certe respondos. Skribu al S-ro Jac. Vonk, Zuiddijk 302, Zaandam.

19-j. junulino dez. kor. Rusujo, Egiptujo, Ĉeĥoslovakujo, Polujo, ktp. pri arto, filozofio, sporto, k.c. Cora Ritman, Bloemgracht 15-17, Amsterdam.

La lernantoj de s-ro W. Koopmans, Vosmaerlaan 3, Hilversum, 9-12-jaraj, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Junulargvidanto en Nederlanda psika-pedagogia instituto bez. adr. ĉiulandajn de s-anoj, pretaj interŝ. il. poŝtkartojn kun grupo da knaboj. Adr: S-ro J. K. de Vries, Stichting „De Dreef”, Groteweg E 3, Wapenveld.

Portugalujo: Ĉar nia E-to movado estas tre malvigla, mi petas instigajn leterojn de instruistoj. Adr: S-ro Brito, Escola No. 13, Rua das Amoreiras, Lisboa.